Korona Viruso kaj Esperanto

Prof. Amri Wandel
Univ. de Jerusalemo
Estraro de UEA

AMO 64 8.5.2020



La nomo de la viruso en Esperanto

Du formoj rekomenditaj de la Akademio:

- **Kronviruso** – pli konata radiko, sed malpli similas al la internacia termino “coronavirus”

- **Koronviruso** - pli fakeca, simila al la internacia termino, “ekstera parto de la suno” lau PIV



- Electron-mikroskopa foto de la viruso:

La epidemio kaj Esperanto

Februaro: subtena letero de la prezidanto de UEA al Ĉinaj e-istoj

AW komencas regule raporti en la FB-paĝo de UEA

Nuligo de la printempaj E-kunvenoj: MT, Hispana K, Israela K

Marto: nova rubriko en E-revuo pri la pandemio kaj Faka Agado

Planoj prokrasti la UK en Montrealo (al 2022)

La speciala retpaĝo de UEA pri la korona viruso

Aprilo: oficiala komuniko pri la prokrasto de la UK en Montrealo

La virtuala Malferma Tago

Ekplanado de Virtuala Kongreso / Festivalo

Korona viruso, Kongresa Universitato kaj nova filatela retejo

Amri Wandel

La nova artikolon en tiu ĉi rubriko, pasintmonate, mi malfermis per pluraj aspektoj de la viruso aperinta en Ĉinio, kiu intertempe fariĝis tutgloba, disvastiĝinte en preskaŭ ĉiupri landojn.

La nombro de infektitoj, kiu komence de marto estis 90 000, malpli ol tri semajnojn poste, la 18.03, superis 210 000 kaj la nombro de mortintoj proksimiĝis al 9 000, preskaŭ trioble ol en Ĉinio. En pluraj landoj la nombro de infektitoj atingis multajn milojn (vidu *https://tinyurl.com/uvclzl9*).

Ne eviteblas do ankaŭ ĉi-numere tuŝi tiun temon, kiu daŭre restas aktuala ankaŭ en Esperantujo.

La vasta agado de UMEA rilate la epidemion aperas en la intervjuo kun ĝia prezidanto Christoph Klawe, *https://tinyurl.com/scfbt8j*. La Akademio plu diskutis la rekomendon de la Konsultejo, kronviruso/koronviruso. Iuj pledis por la tria varianto, koronaviruso, en radika formo. Mi plu uzas la varianton "koronviruso", prefere en la formo "korona viruso", kiu plej similas al la internacia termino "coronavirus".

Organizantoj kaj aliĝintoj de pluraj internaciaj renkontiĝoj konsideras la eventualan efikon de la epidemia disvastiĝo. Evidente en la novaj cirkonstancoj ne povas okazi la Mezorienta Kunveno en Turkio (pri la Mezoriento vidu, ekzemple, la raporton – *https://tinyurl.com/w7z8qu5*).

Estis nuligitaj la Internacia Junulara Festivalo en Torino, la Hispana Kongreso (*https://eventaservo.org/e/1dBFJqPEeC876yFh*) kaj pluraj aliaj. La Israela Kongreso kiu devus okazi komence de aprilo en Tel-Avivo, estis prokrastita je unu jaro (vidu, ekzemple, *https://sezonoj.ru/2020/03/israelo-2/*). Intertempe UEA daŭrigas la preparojn por la UK en Montrealo, sed prokrastis la limdaton de la dua kotizaltiĝo je unu monato, ĝis la 01.05.2020 (vidu sube). Iom da espero tamen donas El Popola Ĉinio, kiu raportas pri la efika bremsado de la epidemio en Ĉinio (*http://www.espero.com.cn/2020-03/17/content_75825296.htm*).

Fonto: www.arcgis.com

Statistika analizo de la datumoj pli bone montras la evoluon de la epidemio. Komparante la nombrojn de infektitoj kaj resaniĝintoj mi verkis modelon, kiu prognozas la nombron de novaj saniĝintoj. Eblas kontroli la prognozon en la afiŝoj de 01.03, *https://tinyurl.com/r4cmwf*, kaj 14.03, *https://www.facebook.com/groups/Universala.Esperanto.Asocio/permalink/1606775799488397/* kiuj ĝis la fermo de la n-ro, 18.03.2020, realiĝis ĉiutage. La blua grafikaĵo en tiuj afiŝoj komparas la datumojn de saniĝoj kun la modela prognozo, dum la flava montras la statistikajn tendenc[illegible] datajn datumojn k[illegible] *korona_viruso*, kie t[illegible] epidemio kaj ĝiaj m[illegible]

La Internacia Kongresa Universitato en Montrealo estos teme riĉa kaj havos plurajn novajn vizaĝojn, se juĝi laŭ la elektitaj temoj kaj prelegantoj. La IKU-komisono (Fiedler, Maitzen, Tonkin, Vergara, Wandel kaj Wen) ricevis 24 proponojn, el kiuj ĝi elektis naŭ por la IKU kaj sep por la Scienca Kafejo. La resumoj aperas en la IKU-paĝo de UEA: *https://uea.org/teko/IKU/*

IKU			
Goodall	Grant	lingvistiko	Alproprigo de dua lingvo: Ĉu ebla post la infanaĝo?
Alcalde	Xavier	Geopolitiko	Geopolitiko, remalkovrita fako
Dubourg	Glatigny Pascal	E-historio	Esperanto kaj la Dua Mondmilito: postmemora aliro al transnaciaj rakontoj
Greatrex	Geoffrey	Historio	Romanoj kaj persoj en la antikvo : milito, arto kaj kulturo
Lo Jacomo	François	Matematiko	La Ora Nombro
Mak	Bill	Historio	La Sciencoj Sur la Silkaj Vojoj
Raola	Orlando	Kemio	Kemiaj faktoroj en provizado de akvo por homaj bezonoj
Sayadpour	Keyhan	Medicino	Genetiko kaj Koro
Spinola	Carlos	Spacveturado	Veturado tra la interplaneda spaco
Scienca Kafejo			
Burghelea	Manuela	Komunikado	Komunikaj teknologioj en indiĝena aktivismo
Dankova	Natalia	Lingvistiko	Dualingva lernado kaj Esperanto-uzo depende de la patrolingvo
Du Temple	Wallace	Historio	La Kanada Odiseado, Lando de nekompletaj konkeroj
Huang	John	Esperantologio	La valoro de Esperanto en ŝanĝiĝanta mondo.
So	Gilsu	Simboloj	La svastiko en antaŭhistoria epoko
Striganova	Anna	Literaturo	Popolaj fabeloj kiel ilo por dialogo kaj interkompreniĝo
Tytgat	Kristin	Lingvistiko	Bruselo, ĉu dulingva aŭ multlingva urbo?

Pandemio, UK kaj Faka Agado en la interreta epoko

Amri Wandel,
estrarano pri scienca kaj faka agado

Dum la lastaj monatoj pli kaj pli okupis la mondan tagordon la korona viruso, kiu de limigita epidemio en Ĉinio rapidege disvastiĝis kaj fariĝis la plej severa pandemio de-antaŭ cent jaroj. Ankaŭ ĉi-foje la rubriko traktos la koronvirusan epidemion, ĝian evoluon kaj la bezonon nutajn post pluraj monatoj, inkluzive la Universalan Kongreson. En la dua parto ni konsideros la estontecon de Faka Agado en la interreta epoko.

Preter la epidemia kulmino

La 20.04 la tutmonda nombro de infektitoj atingis 2,5 milionojn kaj la nombro de mortintoj — 170 000. Eblas sekvi la ĝisdatan staton en la koronvirusa paĝo de UEA, *https://revuoesperanto.org/korona_viruso*. La ĉefaj fokusoj de la epidemia kresko estas Eŭropo kaj Usono, kiel montras la mondmapo, en kiu la landoj estas koloritaj laŭ la ĉiu-taga nombro de novaj infektitoj. Tiu nombro indikas la disvastiĝ-ritmon de la epidemio. La monata nombro atingis kulminon meze de aprilo kaj poste komencis malkreski. Fakuloj taksas ke ĝis junio la disvastiĝo de la pandemio estos bremsata.



La UK en Montrealo

Kial tamen estis necese prokrasti la Universalan Kongreson en Montrealo? Efektive ne nur la UK, sed ankaŭ multaj aliaj konferencoj kaj aranĝoj en Montrealo kaj tutmonde estis nuligitaj, virtualigitaj aŭ prokrastitaj. Klarigas la kialojn la komuniko de UEA, *uea.org/gk/862a1*. Ne temas nur pri la fermo de la kanadaj limoj, almenaŭ ĝis la fino de junio, sed ankaŭ pri la devo de kvaranteno kaj malpermeso okazigi grandajn kunvenojn, kiuj verŝajne daŭros ankaŭ poste. Pro la escepta kaj senprecedenca situacio, la Estraro decidis ebligi al la aliĝintoj uzi la kotizon por la UK en 2021 aŭ 2022. Tamen, por finance helpi al UEA en tiu malfacila tempo, estos alte aprezata donaci la kotizon. Tiu donaco ankaŭ helpos organizi Virtualan Kongreson kiun UEA planas okazigi anstataŭ la UK (*uea.org/gk/864a1*).

La estonteco de Faka Agado

Dum diskuto en la retlisto *UEA-membroj* oni skribis "ŝajnas ke la tuta labor-kampo Faka Agado de UEA bezonas rekonceptadon". Mi respondis:

"Eble venis la tempo redifini la koncepton "Faka Asocio". La tempoj ŝanĝiĝis. La interreto nun prezentas novajn eblojn, sed ankaŭ ŝanĝas la malnovajn kutimojn kaj regulojn. Tamen, unu regulo restas, ke en la bazo de ĉiu aktiva faka grupo devas troviĝi homa teamo, eĉ nur unu-du aktivuloj. Tion ne povas anstataŭi ekstera instigo.

UEA povas provizi per rimedoj por ekzistantaj pli-malpli aktivaj fakaj asocioj, kiel kadrojn por internaciaj kontaktoj inter samfakanoj aŭ aliaj fakaj grupoj, ekzemple dum la UK (Movada Foiro, Faka Forumo kaj jarkunveno), lokon sin prezenti en la revuo (tiu ĉi rubriko) aŭ en la platformo planita en la nova retejo de UEA, kaj proponi kontaktojn kun internaciaj ne-esperantistaj asocioj en la sama fako. Sed UEA ne povas revivigi malaperintajn aŭ longe senagajn fakajn grupojn".

Universala Kongreso

La montreala UK prokrastita

Ĵenja Amis

Se iu dirus al mi antaŭ kelkaj monatoj, ke la UK ne povus okazi, mi certe ne kredus... La UK-oj okazas ĉiujare, nur escepte de la du Mondmilitoj... Nur dufoje en la pasinta jarcento estis UK antaŭpreparita sed devis esti nuligita: 1914 en Parizo, kaj 1967 en Tel-Avivo, ambaŭ pro milito... Ni estas tristaj, ke la Montreala UK, kiun ni preparas jam de pluraj jaroj, malfeliĉe, devas prokrastiĝi pro la pandemio de koronviruso...

La LKK de la UK en Montrealo

La 30-an de januaro aperis la reta versio de la Dua Bulteno pri la Montreala kongreso, kiun UEA kaj LKK preparas jam de monatoj. En la sama tago, la Monda Organizaĵo pri Sano (MOS) deklaris epidemion de koronviruso – la 11-an de marto MOS nomos ĝin pandemio... Nur unu tagon poste (la 12-an de marto), mi iris al mia (jam preskaŭ malplena) laborejo, la Nacia Filmoficejo: preskaŭ ĉiuj "neesencaj" oficejoj, lernejoj ktp. estis jam fermitaj tra Kebekio. Tiu vendredo, la 13-a, estis la lasta tago, kiam mi povis eniri en mian laborejon. Post iom da tagoj ĝuste tie, sub la fenestroj de mia laborejo, en la koro de la urbocentro de Montrealo, sur la fama Festivala Placo, en la Kvartalo de Spektakloj, malfermiĝis la testocentro por KOVIM-19: kelkaj grandaj blankaj militecaj tendoj, kiuj staras en la lokoj, kie normale tra la tuta somero estas scenejoj, glaciaĵejoj kaj kien venas dekoj da miloj da homoj, kun familioj, por ĝui la faman montrealan someron de muziko, dancoj, ridoj kaj amuziĝoj.

Retpaĝo de UEA pri Korona Viruso

https://revuoesperanto.org/korona_viruso

Korona viruso kaj Esperantujo

• Amri Wandel

• De mia antaŭa raporto pasis apenaŭ unu semajno, sed ŝajnas ke la mondo renversiĝis...
• La GK de UEA
• La GK de UEA pri la plano prokrasti la UK-n en Montrealo
• La GK de UEA. La Universala Kongreso en Montrealo prokrastita al la jaro 2022
• La Akademia rekomendo pri la nomo k(o)ronviruso
• Klarigo de Anna Löwenstein pri la nomo de la viruso en E-o en la retejo uea.facila

• La tri ĉefaj KV-datumretejoj:
- https://www.worldometers.info/coronavirus/#repro
- https://www.arcgis.com/apps/opsdashboard/index.html#/bda7594740fd40299423467b48e9ecf6
- https://ourworldindata.org/coronavirus (**Esperantigo de la resumo de tiu retejo**)
• Laŭlanda evoluo de infektitoj (konstante ĝisdatiĝanta grafikaĵo)
• Laŭlanda taga nombro de novaj infektitoj (konstante ĝisdata grafikaĵo)

• Konsiloj por la provirusaj paŭzoj

Aktuala numero

Legu

Kulturo
Universala Kongreso
La 104-a Universala Kongreso en 2019

Evoluo de la koronvirusa pandemio

La suma nombro de infektitoj atingis 4 milionojn

La nombro de mortintoj: 380,000

- Kiam bremsiĝos la pandemio?
- La taga kresko de infektitoj kaj mortintoj
- La procentaĵo de mortintoj

Taga kresko de infektitoj, 7.5.2020



Sumo de infektitoj laulande



Evoluo de la taga nombro de novaj infektitoj



Taga nombro de mortintoj, 7.5.2020



Evoluo de la taga nombro de mortoj



Stato de infektitoj kaj mortoj laulande



Source: European CDC – Situation Update Worldwide – Last updated 7th May, 11:15 (London time)

CC BY

Prognozaj statistikaj modeloj de A.Wandel







La Virtuala Kongreso

Anstataŭ la UK en Montrealo

- Jul-sept.2020: Monda Festivalo
- Koncertoj
- Kulturaj programoj
- VEKI – Virtuala E-Konf. de ILEI
- VK – Virtuala Kongreso (aŭg)
- Internacia Kongresa Universitato
- Prelegoj, Kleriga(j) Lundo(j)
- Virtualaj Eskursoj

La post-koronvirusa mondo kaj Esperantujo

- Homoj fariĝos pli toleremaj, kunlaboremaj, paciencaj
- Homoj lernos pli aprezi la sanon, la medion, la vivon
- Internaciaj kontaktoj per la retaj rimedoj
- Virtualaj internaciaj kunvenoj per konferencaj programoj Zoom, Skype, Youtube, Facebook…
- Pli da reta studado, inkl. E-kursojn kiel Duolingo
- Virtualaj E-kongresoj kaj konferencoj
- Hibridaj Universalaj Kongresoj:
  modeste ĉeestaj, amase virtualaj!

Resumo

- Regulaj raportoj pri la koronviruso en la FB-paĝo de UEA
- La nova rubriko FSP en *Esperanto* pri la pandemio kaj Faka Agado
- Speciala retpaĝo de UEA pri la korona viruso
- UEA prokrastis la UK-n en Montrealo al 2022
- La virtuala Malferma Tago
- Ekplanado de Virtuala Kongreso / Festivalo

Dankon por la aŭskultado ☺

Demandoj?